

KOMUNIKOJ

TRIMONATA BULTENO DE SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ
Jaro 46-a BRAZILIO, JULIO-AŬGUSTO-SEPTEMBRO 2022 N-ro 187

“Amu vian Dion per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta menso kaj vian proksimulon kiel vin mem.”
Jesuo (Mt, 22:37-40).

“Neskuebla fido estas nur tiu, kiu povas rekte rigardi la racion en ĉiuj aĝoj de la homaro.”
Kardec. *La Evangelio laŭ Spiritismo*.
Ĉap. 19, §7.

“Sur neŭtrala lingva fundamento, komprenante unu la alian, la popoloj faros en konsento unu grandan rondon familian.”
Zamenhof. *La Espero*.



NI KULTIVU PACIENCON

Paulo Sérgio Viana

Dum la lastaj jaroj, ŝajne la homaro plongis en strangan, ĝeneralan malsanon: mankas al ni pacienco. Ĉio devas okazi rapide, urĝe. Se oni ne respondas al mesaĝo post kelkaj minutoj, la mesaĝinto ekkoleras. Mesaĝoj mem devas esti fulmaj, prefere skribitaj per strange mallongigitaj vortoj. Aŭtoj sur ŝoseoj kaj stratoj aspektas, kvazaŭ ili konkuris pri rapideco. Informoj en televidaj ĵurnaloj ne daŭru pli ol kelkajn sekundojn. Ni manĝas rapide. Ni dormas maltrankvile, jam pensante pri morgaŭaj problemoj. Neniu volas “perdi sian tempon”.

Mankas pacienco ankaŭ por elteni kontraŭajn opiniojn kun sereneco. Homo malkonsentanta estas potenciala malamiko. Ordinaraĵojn suferojn, kiuj neeviteble estas parto de la homa vivo, oni konsideras grandaj katastrofoj.

Ni ĉiuj bezonas... reakiri paciencan.

Ĉu vi jam pensis pri la deveno de la vorto? Malgraŭ ia ŝajno, ĝi ne devenas de la vorto “paco”. Ĝi devenas de “pathos” (sufero, sento: la sama deveno de “patologio” kaj “empatio”) kaj “scio”. Do, pacienco signifas origine “scii suferi”, “scii senti”.

Spiritistoj klare komprenas tiun etimologion. En la Evangelio laŭ Spiritismo troviĝas inspiroplena paĝo pri pacienco en la 9-a ĉapitro. Resume: ni naskiĝis por evolui, por lerni. Nia spirito devas lerni racion kaj emociion, por progresi. Por tio, estas nepre necese travivi malfacilaĵojn, kaj se oni trapasas ilin kun fido kaj ekvilibro, en laboro kaj rezignacio, tiam ni finos la koncernan vivon iom pli “bonaj” ol kiam ni ĝin komencis. Sen defioj ne eblas evoluo, kaj nia devo estas labori por tio. Same kiel infanoj en lernejo. Ĝi estas Dia leĝo.

Tamen, ne sufiĉas suferi, sed “saĝe suferi”. Se ni suferas kaj nenion lernas, pro nia egoismo, ribelemo kaj spirita blindeco, tiam nia sufero nenion valoris.

Ni profunde meditu pri tio: pacienco estas esence grava en nia vivo. Se ni “scias suferi”, se ni “scias senti” la dolorojn de nia proksimulo same kiel la niajn, tiam ni troviĝas sur vera vojo al lumo.

Jen tasko por ĉiu momento, por ĉiu tago.

Pacienco donas senco al nia vivo.



VENKU LA PESIMISMON!

Ke la Natur' kruela estas, frato,
vi diras; ke por vivi ja bezonas
la hom' kaj besto' mortigi, sen kompato,
vivantojn, kiel la malsat' ordonas.

Ke en militbuĉad' la mondo dronas,
milmile detruig'as viv' sen ŝato,
la malamikon neniu pardonas,
detrui lin ja devas la soldato.

Vi pravas; sed memoru ke surtere
ne povas regi pac', dum la homaro
ne vivos kiel bonaj fratoj vere;

la tera vivo estas nur preparo
por vivo en spiritaĵaj altaj sferoj,
en kiuj realiĝas pacesperoj.


Spirito: Abel Gomes
Mediumo: Porto Carreiro Neto
Reformador (FEB), Aŭg 1946, p. 189

Ekde la nuna numero de Komunikoj, ni prezentos klasikajn rakontojn el la kolekto "Trezo" (Esperanta Novelarto), eldonita de Hungara Esperanto-Asocio, 1989, kompilita de Reto Rossetti kaj Henri Vatré. Ni komencas ĉiklasikajn rakontojn per unu al la plej kompetentaj klasikuloj de la E-movado: Kabe. Jen ĝi.


URSA SERVO

ERMITO EDUKIS URSON kaj tiel bone ĝin instruis, ke ĝi servis al li, kvazaŭ homo. La urso ĉasis por li, portis lignon, gardis la dometon kaj akompanis lin ĉien, kvazaŭ fidela hundo. Foje, en varmega tago, la ermito dormis sur herbo en la ombro de l' foliriĉa arbo. Apud li sidis la urso kaj forpelis muŝojn, kiuj amase flugis ĉirkaŭ la maljunulo kaj ne lasis lin trankvila. Precipe unu muŝo tede atakis lin. Jam kelke da fojoj la urso forpelis ĝin, sed ĝi ĉiam revenis kaj sidigante jen sur la orelojn, jen sur la vangon, mordis lin. La urso ne povis plu toleri tion kaj kolere ekcriis: "Atendu, tedulo! Vi tuj ĉesos maltrankviligi mian sinjoron!" Dirinte tion, ĝi kliniĝis kaj levinte grandan ŝtonon, tiel lerte jetis ĝin, ke ĝi ne sole mortigis la muŝon, sed ankaŭ dispecigis la kranion de l' ermito.

D-ro **Kazimierz BEIN**, pseŭdonime **Kabe** (naskiĝis la 29-an de februaro 1872 en Sierżnia, en la komunuma distrikto de Stryków, kaj mortis la 15-an de junio 1959 en Łódź), pola okulkuracisto, krome leksikografo, tradukisto kaj dumtempe tre aktiva esperantisto kaj vicprezidanto de la Akademio de Esperanto. Li estis unu el la plej grandaj stilistoj dum la frua periodo de la Esperanto-literaturo.



Kabe (1872-1959).



KOMUNIKOJ | Jaro 46-a
| n-ro 187 | Julio-Aŭgusto-Septembro | 2022
SPIRITISMA ELDONA ASOCIO
FRANCISCO VALDOMIRO LORENZ
Fondita la 15-an de Decembro 1975
Adreso: Rua Aníbal Bruno, 18 - Santa Cruz
23520-210 - Rio de Janeiro-RJ – Brasil (Brazilo)
☎ +55-21-98427-8080
Librovendejo: editoralorenz.com.br
Retadreso: editora_lorenz@uol.com.br
Fejsbuko: Editora Lorenz

| Kompostita de Rogério Mota |



Zamenhof

Kuriozaĵoj el la Leteroj de Zamenhof

Al s-ro T. en S. Petersburgo. (o.v. II-29)

Vi miras, ke en la Adresaro unuj nomoj kaj adresoj estas skribitaj per ortografio Esperanta kaj aliaj per la diversaj ortografioj naciaj: jen estas la kaŭzo de tiu ĉi strangaĵo: Ne volante arbitre ŝanĝi la nomojn de niaj amikoj, ni presis ĉiun nomon kaj adreson tiel, kiel ĝi estis alsendita al ni. La adresojn, kiujn ni ricevis skribitaj per literoj latinaj, ni lasis en la formo en kiu ni ilin ricevis (plejparte en ortografio nacia); nur la adresojn skribitajn per aliaj literoj (ekzemple rusaj), kiujn ni jam sen tio devis transmeti en alfabeton latinan, ni transmetis jam laŭ nia ortografio. La logiko kategorie ordonas, ke por ĉiuj nomoj estu enkondukita unu egala ortografio (la simpla ortografio Esperanta), ĉar alie, trovante en verko Esperanta ian nomon, oni neniam scios, kiel ĝin elparoli. Sendube tio ĉi poste estos enkondukita, kaj post kelkaj jaroj la skribado "Byron" anstataŭ "Bajron" aŭ "Göthe" anstataŭ "Gete" kredeble estos rigardata kiel eraro. Tamen doni jam nun kategorian, difinitan kaj ĉiamdevigan regulon por la skribado de nomoj ne estas ankoraŭ tempo, kaj en la daŭro de kelka tempo ni devas ankoraŭ lasi al ĉiu skribi la nomojn, kiel li trovas la plej oportune, aŭ laŭ la ortografio Esperanta, aŭ laŭ la ortografio de la nacio, al kiu la nomo apartenas. La fina formo por la skribado de nomoj estos sendube la ortografio fonetika, kaj al tio ĉi ni devas ĉiam celi kaj alkutimi; sed nun ni ofte devas ankoraŭ uzadi la ortografion nacian, ĉar nia ortografio estas ankoraŭ tro malmulte konata en la mondo kaj, donante en tiu ĉi ortografio nian adreson, ni riskas, ke leteroj adresitaj al ni eble ne venos al niaj manoj. Al tiu ĉi demando ni ankoraŭ revenos en aparta pli detala artikolo, sed ĝis la demando estos difinite decidita per uzado, ĉia maniero de skribado de nomoj estas bona, se nur estos komprenebla por la leganto.

Zamenhof



INTERNE DE LA HEJMO

KULTURU EN VI LA DELIKATECON, kiu forviŝas vian kolerecon.

Internigu en vi mem la malkolerecon kaj resendu ĝin laŭ la formo de afabla rideto, signifanta komprenadon.

Lernu malstreĉiĝi, forigante la maltrankvilecojn kaj la troajn esperojn pri aliuloj kaj ankaŭ pri vi mem.

Nu, proksimiĝu al viaj koncernatoj... kaj lernu konsenti kun ili.

Memoru, ke ili atendas kaj observas...

Ili sentas kaj resentas, pro viaj eksplodoj, tiujn etajn tempestojn, kiuj agresas kaj invadas, krude kaj abrupte, la atmosferon de via sanktejo — via hejmo!

Malkovru en via internaĵo la mildecon, kaj permesu, ke ĝi lulu la minutojn de via kunvivado en la familio. La afableco dissendas mildajn vibrojn, estigante simpation kaj kunfidon en tiuj, kiuj marŝas ĉe via flanko.

Se vi ligiĝas al ili tiamaniere, per la ligiloj de la amo kaj de la respekto, vi ja konstruas la bazojn de la estonteco sur la vojo de la tempo.

Protektu vin per via preĝado.

Protektu vin per la mantelo de la humileco.

Silentu! Silentigu la insistan kritikon.

Mildigu vian parolon.

Moderigu vian temperamenton kaj renovigu vian konduton. Tiel, vi estos pli feliĉa.

Tiam, ririgardu tiujn, kiujn vi kunigis al vi por ĝui la vivospertojn. Ĝuu iliajn dezirojn kaj esperojn.

Ili ankoraŭ esperas kaj observas...

Ili atendas vian afablecon kaj vian rideton...

Ili rigardas viajn agmanierojn... vian manieron "esti" kaj "agadi"...

Ili esperas de vi kuraĝigon kaj afablecon.

Ili atente rimarkas viajn reagojn kaj registras viajn ekzemplojn.

Sekvu, do, Jesuon, kondukante per Pac-vibrado kaj Fido tiujn, kiuj, ĉe via flanko, malkovras la ĝojon ami kaj kunvivi.

Plivalorigu kaj benu la tempon, kiun kun ili vi uzas por postuli malmulton kaj ami plimulte.

Certe vi estos pli feliĉa, se vi disdonos ĉirkaŭ vi la mildecon de tiuj etaj trezoroj: viajn lumeretojn..., viajn pecetojn da paco!

Spirito: Icléia

Mediumo: Brunilde Mendes do Espírito Santo

Tradukis el la portugala: Benedicto Silva





KIOM DA LUMO!

Kiom da lumo en ĉi medio!

Sankta medio, dediĉita al la amo de l' Patro, dediĉita al la laboro inspirata de Jesuo, estiganta lumon kaj helpon por tiuj bezonantaj la helpan agadon de l' laboruloj de la Kristo.

Verŝiĝanta sur nin!

Ĉiufanken disradianta, fontanta el la supro, povanta esti uzata por pli kaj pli lumigi al ni la ridetojn. Tia lumo transformiĝas en rozpetalojn, en refreŝigan nebulpluvon, en mildajn neĝoflokojn. En kia ajn formo montriĝas tia lumo, ĝi ĉiam havigas al ĉiuj bonstaton kaj refortiĝon. Kiel plezure estas senti tiujn momentojn de korfaciliĝo, de ĝojo, de trankvilo!

Vibranta en nia menso!

Reflektanta en nia menso ĉion plej karan al ĉiu homo, ĉion belan kaj noblan. Vibras en nia menso la altspirita energio de la amo al Dio, vibras la sanktaj kordoj de la etera violono, gloranta la reĝecon de Dio kaj la sublimon de la vivo.

Kiom da lumo!

Multa lumo, multa energio ĉiujn envolvanta.

Kiam en preĝa sinteno!

En enemiĝa sin koncentrado, en primedito pri la regno de Dio ĉiam pli kaj pli proksima. En preĝa glorado al la Kreinto; en preĝado por peti pri protekto kaj interveno kaj en preĝado, kun koro pulsanta de emocio, por danki la montojn da ricevataj donoj kontraste kun niaj liliputaj meritoj.

Kiel kreskas la animo antaŭ la okuloj de Jesuo!

Jesuo, dia frato, ĝardenisto de nia hejmo, kiu preparis nian tutan medion por ke ni povu kreski ĉiam pli kaj pli. Kaj liaj okuloj, tiel lumaj kaj dolĉaj, tiel firmaj kaj rezolutaj, transigas kuraĝon kaj forton, por ke ni pluiru nian vojon, kaj transigas forton kaj ordon kvazaŭ retenante torentojn da pasioj, fontantaj el nia memo trompita kaj droninta en nesciado.

Kiom da lumo verŝiĝanta sur nin!

Ni lasu nin inundi per la dia lumo abunde ŝprucanta. Tian lumon ni rikoltu por ĝin tuj disdoni. Ĉiufoje, kiam ni ĝin distribuas, iras kune niaj ombroj, eble por ĉiam.

Kiom da lumo!

Jesuo jam descendis de la kruco, sed ni ankoraŭ lin pendumas, pro eraroj en nia pasinteco, pro "respiroj" de la momentoj de senscio, pro timo antaŭ respondecado, pro volado pri senpripensado.

Kiom da lumo!

Kiom da lumo!

Ni estas kun Jesuo!

Dank'al Dio.

Spirito: Francisco

Kunlaboris: Johano Marrara

Esperantigis: Affonso Soares





Belajaĵoj el mia urbo

LA ĈI-NUMERA **KUNLABORANTO** estas la brazila samideano Marcelo de Castro Santana, el la urbo Aracruz, Ŝtato Espírito Santo. Marcelo estas ano de Eldonejo Lorenz kaj konstanta kunlaboranto de *Komunikoj* kaj *Almanako Lorenz*. Dankon, kara frato pro la belaj fotoj!

Se vi, karaj gelegantoj de *Komunikoj*, volos aperigi belajaĵojn el via urbo, ĝardeno... fotu, sendu al ni kaj, kun granda ĝojo, ni ilin aperigos en nia bulteno. *Komunikoj* estas legata en pli ol 110 landoj!

ALMANAKO LORENZ

2022



Finfine, jen la tradicia **Almanako Lorenz**, eldono 2022! Kiel ĉiam, riĉenhava kun pluraj neeldonitaj kronikoj, eminentaj verkistoj el pluraj landoj. La ĉi-jara numero estas omaĝe al la naskiĝa jubileo de **Francisco V. Lorenz**. La ĉi-numera intervjuo estas kun la eksprezidanto de **UEA**, la hinda samideano **Probal Dasgupta**.

Petu tuj vian ekzempleron:
editora_lorenz@uol.com.br / (21) 98427-8080

LORENZ



LA **MALBONAJ PENSOJ** venenas la animon. Ili altiras la pesimismon, kaj la malsanigajn ĉeestojn de la perturbitaj kaj malbonaj Spiritoj.

Tenu vian menson ligita al la pozitivaj lumoj, ideoj, kaj al la nobligaj programoj de kies konduto venos la intima bonfarto kaj la ĝojo vivi. Kion vi pensas intense, tio hodiaŭ aŭ post kelka tempo realiĝos.

La faktoj komence enkorpiĝas en la menso, kaj poste ili fariĝas realaĵo en la fizika korpo. Pensu pri la bono kaj vin banu per la lumo de amo.

Libro: *Vivo feliĉa*
Spirito: Joanna de Ângelis
Mediumo: Divaldo Pereira Franco

Sylvio Walter Xavier

DUM PLURAJ JAROJ la generalo Sylvio Walter Xavier direktis la bultenon Spiritisma Servo de Informoj (SSI), estante mem ankaŭ la respondeculo pri ties unuapaĝa ĉefartikolo, kie, sub sia kod-nomo S.Xavier, li ĉiusemajne, kun sentokapablo kaj klareco, pritraktadis aktualajn temojn, sub spiritisma vidpunkto. Al la bulteno kreita sub orientado, kiun pere de Chico Xavier la Spirito Emmanuelo diktadis al li, li dediĉadis la saman kareson, kiu disfamis lian administradonĉe "Lar Fabiano de Cristo" kaj ties subtenanton— Capemi. Li eĉ estris tiujn du instituciojn post la morto de ilia fondinto, lia amiko, Jaime Rolemberg de Lima, en 1977.

Ĉe la administrado de tiuj du gravaj institucioj li konervis la saman eminentecon, kiu distingis lian vivon en la soldataj rondoj. Inter liaj ĉefaj militistaj aktivaĵoj estas tio, ke li apartenis al la unua taĉmento de brazilaj paraŝutistoj, kaj ankaŭ faris kursojn de specialiĝo en diversaj landoj.

La sindediĉo de Sylvio Xavier al Spiritismo montriĝis ankaŭ ĉe la esperantistaj laboroj, en kiuj li ĉiam apogis la projektojn de la tielnomata Neŭtrala Internacia Lingvo, kaj ankaŭ de ties frateco-principoj, laŭ perfekta unuiĝo kun la instruoj de Spiritismo. Cetere, Generalo Xavier ĉiam elstare troviĝis strikte ligita al la spiritismaj instruoj. La ĉeesto de Generalo Xavier estis tre grava en ĉiuj kunsidoj de la Spiritisma Eldona Societo F.V.Lorenz dediĉitaj al la diskutado pri



la direktoj en la disvastigado de Spiritismo tra la mondo, per Esperanto.

Naskiĝinta en Rio-de-Ĵanejro, la 13-an de julio 1915, li estis filo de Antônio da Costa Xavier kaj Raquel Rosa Teixeira Xavier. Li edziĝis kun Maria José Costa Sampaio Xavier en 1939, kiam li ankoraŭ estis unua leŭtenanto. Kun ŝi li starigis familion kun tri filoj: Adilson, Ayrton kaj Amilton, kiuj donis al li naŭ nepojn.

Kiel konscia spiritisto, li rezigne kaj kuraĝe elportis la elkarniĝon de Adilsonkaj Amilton— la unua pro aŭtomobila akcidento, kaj la dua pro infarkto.

Pro sia alta aĝo, S. Xavier sentis, ke la korpa malforteco devigis lin ĉesigi siajn agadojn ĉe Lar Fabiano de Cristo, Capemi kaj SEI; li tamen ĉiam informiĝis pri ĉio, kio okazis, kaj partoprenis en tiuj organizaĵoj per siaj ĉiam valoraj konsiloj al la kunlaborantoj tiam subtenantaj la direktado-devojn. Malgraŭe, ĉiam kiam li povis, li tien revenis por revidi siajn amikojn. Fakte, li estis unu el la plej amataj homaj figuroj, kun sincera rideto kaj amika parolo, ĉiam preta por konsoli.

Sylvio Walter Xavier elkarniĝis en Rio-de-Ĵanejro, la 28-an de decembro 2001, pro naturaj malsanoj, 86-jaraĝa. Lia korpo estis sepultita en la Tombejo São João Batista, en la Suda Zono de Rio-de-Ĵanejro, kun grandnombra ĉeestantaro.

Esperantigis: Benedicto Silva

NI INTERĜANGU KULTURON PER LIBROJ!

VI, KIU ŜATAS LEGI, koni aliajn kulturojn, filozofiojn... jen grava oportuno: Eldonejo Lorenz ne nur sendas, senpage, viajn librojn al niaj eksterlandaj samideanoj, sed ankaŭ akceptas librojn el aliaj kulturoj, filozofioj ktp. Estos granda plezuro ricevi verkojn el diversaj landoj kaj ilin diskonigi inter niaj membroj!



Reeldono de granda sukceso de Eldonejo Lorenz kaj
Brazila Spiritisma Federacio. Se vi ankoraŭ ne havas
vian ekzempleron, petu tuj: editora_lorenz@uol.cm.br

907 paĝoj
46 mil kapvortoj
27,5 x 20,5 cm

© 55 (21) 98427-8080



DANĜERA ANGORO

EL LA ANIMSTATOJ, kiuj ruĝalume signalas en la trafiko, la angoro estas tiu plej grave danĝera. Krepusko de la espero, la estiĝo de angoro kovras per ombro la helan sunon de la racio, kaŭzante perturbon al la perceptado kaj senintereson por la daŭrigado de la batalo.

Malbona konsilanto, ĝi elspiras pesimismen, pleniĝante tiun, kiu suferas ĝian konstrikton per silenta ribelemo kontraŭ ĉio kaj ĉiuj.

Ĝi apartigas de la socia kunvivado sian viktimon kaj sekrete prezentas al li, en senfina malkuraĝiga kolokvo, falsajn motivojn por la suicida fuĝo.

Subtile alieniĝante for de la realo, la homo en angora krizo troviĝas tre proksime de la fizika memdetruo.

Ĉar de la vivo li vidas nur la negativan flankon kaj rimarkas nur la malagrablajn impresojn, tia malsanulo bezonas urĝan helpon, kiun li mem devas al si havigi, kvankam kun grandega peno, kaj ankaŭ la kunhelpon de la familianoj, kiuj devas lin asisti kun pacienco kaj specialigitaj rimedoj.

Sen forlasi la kuracistan terapion, ni sugestas al la angora paciento skemon de urĝeco, kiu rezultigos al li sanigan reekvilibron.

La vizito al tiuj kiuj solece disputas peceton da amikeco, al personoj kun la korpo kovrita per vundoj, bezonantaj tiun, kiu referu la bandaĝon, al individuoj en ĉagrenaj saŭdadoj, kiuj devenas de la foriro de amatoj

elkarniĝintaj, al kreitoj terurigitaj antaŭ neresanigeblaj malsanoj, al viroj kaj virinoj lacegaj pro batalo, al infanoj halucinitaj pro la forlaso, tiuj estas faktoroj stimulaĵoj por la memvenko.

Ne mankas malsanuloj laŭ la korpo kaj laŭ la animo en necesbezono, atendantaj amikan kaj konsolan ĉeestanton.

Abundas la viktimoj de la tiel nomata maljusta kaj kruda socio en la nuntempo, en getoj kaj domaĉoj, kvartalaĉoj, marĉoj kaj enŝoviĝoj, ĉiuj falintaj sur la stratoj de ekonomia kaj morala mizero, kiuj silente aŭ agrese petegas helpon, la plej minimuman.

Ili estas okazoj por komparado inter nia havo kaj tiu, kiun ni observas manki ĉe aliuloj, kiuj tamen penas daŭre vivi.

* * *

Se angoro provas eniĝi en viajn sentojn kaj regi vian menson, reagu per ĉiuj viaj fortoj kaj eliru por helpi vian proksimumon.

La kontakto kun tiuj, kiuj pli multe suferas ol vi, vekos vin al la ĝojo vivi, kaj instruos vin danki al Dio ĉi tiun okazon kaj ĝin gajni per kuraĝo kaj laboro.

Libro: *Lumo de l' espero*

Spirito: Joanna de Ângelis

Mediumo: Divaldo Pereira Franco

El la portugala tradukis: Délio Pereira de Souza





56-a BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO
40-a BRAZILA ESPERANTISTA JUNULARA KONGRESO
14-a ESPERANTA KONGRESO DE LA ŜTATO DE SAN-PAŬLO

De la 12-a ĝis la 15-a de Novembro en Ribejran-Preto-SP.

Organizado:



Brazilia Esperanto Ligo (BEL)



Brazilia Esperantista Junulara Organizo (BEJO)



Esperanto-Asocio de San-Paŭlo (EASP)

Aliĝoj: <http://esperanto.org.br/kongreso/>



Eldonejo Lorenz apogas kaj aplaŭdas!

LORENZ

ALMANAKO LORENZ 2023

Tuj post la lanĉo de **Almanako Lorenz 2022**, ni komencas prepari la eldonon 2023. Do, karaj, estas tempo por sendi viajn kronikojn. Se vi volos partopreni **Almanakon 2023**, skribu al editora_lorenz@uol.com.br kaj ni sendos al vi detalojn kiel limdato, litero de la teksto ktp. Ni pliatentigas vin ke **Almanako Lorenz** estas legata en pli ol 100 landoj, en la papera aŭ pdf-a versioj.



AMIKOJ DE LORENZ



Maria das Dores Barcellos
(1960)

Maria das Dores Barcellos naskiĝis en Canápolis, Minas Gerais, la 18-an de julio 1960. Ŝi emeritiĝis kiel oficistino de Federacia Ĉambro de Deputitoj.

Maria Barcellos instruas Esperanton ĉe Sociedade Espírita de Assistência e Estudo (SEAE), en Brasília, kaj jam partoprenis en multe da esperantaj eventoj, ĉefe en Universalaj Kongresoj. Ŝi estis financa direktorino de Brazila Esperanto-Ligo.

Barcellos organizis gravan ekspozicion pri Esperanto en la Ĉambro de Deputitoj, de la 4-a ĝis la 15-a de aprilo 2011, celante disvastigi la lingvon. La 6-an de aprilo, Paulo Nascentes, Lício de Almeida Castro (tiam prezidanto de BEL) kaj Ursula Grattapaglia prelegis pri Esperanto al pli ol cent homoj. La solenaĵo finiĝis per koktelo kaj amikaj interparoloj. Okaze de la evento oni disdonis centojn da informiloj pri nia lingvo kaj la radio-stacio de la Ĉambro de Deputitoj elsendis informojn pri la ekspozicio.

Ŝi partoprenis en komisiono de BEL kaj “Câmara Brasileira da Língua Internacional Esperanto” por agadi ĉe la Eduka Komitato de la Federacia Ĉambro de Deputitoj, celante la aprobon de la Leĝa Projekto n-ro 6.162/2009, kiu enkondukos la nedevidan instruadon de nia lingvo en mezgradaj lernejoj.

Ŝi respondecis pri la eldono de la libreto “Línguas- diversidade e discriminação” (Lingvoj- diverseco kaj diskriminacio). Maria Barcellos, malavara virino, monhelpas Eldonejon Lorenz por ke ĝi eldonu spiritismajn librojn en Esperanto kaj finance apogas gejunulojn por partopreni en naciaj kaj internaciaj Esperantaj eventoj.

Kunlaboris: Eurípedes Barbosa



UNUA KONGRESA BULTENO 62-a Argentina Kongreso de Esperanto

**07-a de oktobro (vendredo) ĝis
10-a de oktobro (lundo)
2022
Ĉef-urbo Bonaero**

KONGRESEJO
Strato Paraguay N-ro 2357
Apartamento N-ro 2
Ĉefurbo BONAERO

Eblas rete
aliĝi:



Regule konsulti
nian ttt-paĝon:



Tie vi trovos la plej freŝajn novaĵojn.



Argentina
Esperanto-Ligo
Ekde 1916



HIROŜIMO-NAGASAKO:

la voĉo de memoro kaj espero Samarkandanoj honoris la memoron de la viktimoj de la atombombado de Hiroŝimo kaj Nagasako

Anatolij P. Jonesov (Samarkando, Uzbekio)



EN AŬGUSTO 2022 aktivuloj de la Klubo de interpopola amikeco "Esperanto" tradicie okazigis en Samarkando (Uzbekio) la paceventojn memore al la viktimoj de la atombombado de Hiroŝimo kaj Nagasako.

La 5-an de aŭgusto - sojle de la Monda tago por malpermeso de nukleaj armiloj - la Samarkand-urba kultura centro № 5 gastigis la kultur-edukan aranĝon por omaĝi la 77-an datrevenon de la atombombado de la japanaj urboj Hiroŝimo kaj Nagasako, kiu forprenis la vivojn de centmiloj da homoj.

Tiutage, la halo de la Kulturcentro estis ornamita per belaj girlandoj el diverskoloraj papergruoj. Kadre de la konstanta ekspozicio de la Esperanto-Klubo estis lanĉita la foto-ekspozicio pri la teruraj postsekvoj de la unua batala uzo de atomarmiloj, pri la neresanigeblaj vundoj kaj suferoj de la hibakuŝoj (tiuuj kiuj sukcesis postvivi la nukleajn eksplodojn) kaj pri la neceso fari ĉion por certigi, ke tiaj tragedioj neniam ripetiĝu ie ajn en la mondo.

Dum la aranĝo, la samarkandaj esperantistoj konigis al la ĉeestantoj siajn impresojn pri partopreno en la pacaj memorceremonioj en Hiroŝimo kaj Nagasako, rakontis kortuŝan historion pri la japana knabino Sadako Sasaki kaj ŝiaj papergruoj, kaj prezentis origami-atelieron...

Al la kunvenaj partoprenantoj estis montritaj dokumentaj lumbildaj filmoj "Hiroŝimo-Nagasako: la voĉo de memoro kaj espero" kaj "Japana gruo", kiuj, kune kun arkivaj fotoj, vaste uzis fotojn faritajn de la samarkandaj esperantistoj en Japanio kaj Uzbekio.

La evento en Samarkando emfazis la gravan iniciaton de la Respubliko de Uzbekio por krei la Zonon sen nukleaj armiloj en Centra Azio - la unuan en la norda hemisfero. Post ratifiko fare de ĉiuj ŝtatoj de la regiono, la koncerna Traktato ekvalidis la 21-an de marto 2009.

La 6-an de aŭgusto 2022, en Hiroŝimo, kiel kutime en tiu ĉi tago, okazis la paca memorceremonio omaĝe al la viktimoj de la atombombado. Hiroŝima urbestro Kazumi Matsui, dum sia parolado en la urba pacmemoriga parko, aparte atentigis la ĉeestantojn pri la vortoj de Leo Tolstoj: "Vi ne povas konstrui vian propran feliĉon je la malfeliĉo de iu alia, via feliĉo kuŝas en la feliĉo de la aliaj".

Ĉiuj partoprenantoj de la kunveno en Samarkando ricevis donace la papergruojn senditajn de niaj amikoj el la Lando de la leviĝanta suno.

La 9-an de aŭgusto la pacmemora evento okazis en la biblioteko de la Samarkand-urba kultura centro № 5.

Ambaŭ aranĝoj elvokis ilustritajn eĥojn en la gazetaro: en la papera kaj reta eldonoj de la regiona tagjurnalo "Samarkandskij Vestnik" (Heroldo de Samarkando) kaj en la prikultura reta revuo "Kultura.Uz". Vidu la koncernajn retligilojn:



La artikolo publikigita en "Samarkandskij Vestnik" interalie citas eltiraĵojn el la kortuŝaj memornotoj de veterana japana fotojurnalisto Yoshito Matsushige (1913-2005), konata pro la plej unuaj fotoj en la detruita Hiroŝimo faritaj de li la 6an de aŭgusto 1945, samkiel fragmentojn de la letero (kiu iam estis sendita al la Samarkanda Pacmuzeo) de Takashi Hiraoka, japana politika kaj publika aganto kaj iama urbestro de Hiroŝimo.

Klubo de interpopola amikeco "Esperanto" planas ankaŭ estonte okazigi pacaranĝojn diversloke kadre de la konstanta kultur-eduka projekto "Hiroŝimo-Nagasako: la voĉo de memoro kaj espero".

Fotoj de Lola Rahimova





SENPAGAJ LIBROJ

Karaj eksterbrazilaj gelegantoj de
Komunikoj en la tuta mondo!

Se vi volos ricevi **NIAJN LIBROJN**
kaj la jarlibron, **ALMANAKO**

LORENZ, **tutesenpage**, per la pdf-a
aŭ papera versioj, sendu al ni mesaĝon
kun via kompleta nomo
kaj poŝtadreso.

Kun granda ĝojo ni ilin sendos al vi:
editora_lorenz@uol.com.br



HOMÁLY BORULT AZ ERDŐRE...

Homály borult az erdőre,
A csend susog ki belőle.
Denevér száll, szól a kuvik,
Lassan a hold előbúvik.

Idő múlik, felhők jönnek,
Egyenesen az erdőnek.
Ott megállnak, némán várnak:
Áldást adnak a határnak.

Majd legyőzi őket a hold:
Tolvaj éjbe fényképét told.
De lassanként sápad fénye:
Futtatja a nap fölénye.

Tülköl a gyár, szól a madár:
"Talpon legyen mindenki már!"
Hol van az éj? A múlté lett:
Újra itt van, él az élet.

LA ARBARON KOVRIS OMBRO

La arbaron kovris ombro
Regas ĝin silenta sombro
Flug' vesperta, striga krio
dume luna antaŭiĝo.

Pasas tempo, nubo venas
super la arbaro ŝvebas.
Tie mute ĝi atendas:
sur la kampon pluvon ĵetas.

Poste venkas luno nubon
nigranokten portas lumon
Pli palas dume la luno...
forpelas ĝin fort' de l' suno.

Fabrikkorno, birdosono
ekstariĝu ĉiu homo!
Nokto pasis, jam matenas,
vivas vivo, realvenas!

Attila József
1921. febr. 20

(1921/Trad: Adrienne Pásztor en 2021.)